

La kongruenco de finaĵoj en Esperanto.

Jam ek de la prezento de la Internacia Lingvo 1987 troviĝas kritikistoj de la lingvo. Oni plurfoje proponis ŝanĝojn de pluraj detaloj en la lingvo. Unu detalo kiun oni fojon post fojo diskutas estas la strikta kongruenco de la finaĵoj inter substantivoj kaj ĝiaj epitetoj.

Ni komencu per analizo la frazo: Bela malriĉa junulo vendas **grandajn nigrajn balonojn**.

Dank' al la gramatika kodado de Esperanto estas eble tuj konstati, ke "bela malriĉa junulo" estas la subjekto de la frazo, kaj ke "grandajn nigrajn balonojn" estas la objekto de la frazo. Pro tio, ke la vorto "vendas" finiĝas per la literoj "as" oni tuj scias, ke temas pri verbo en estanta tempo, t.e. la predikato.

La gramatika kodado donas eblecon utiligi iun ajn vortordon en la aktuala frazo.

Ekz. "Nigrajn malriĉa grandajn junulo balonojn bela vendas.", kaj pluraj aliaj

Se oni aldonas informojn pri loko, kie la vendado okazas kaj, al kiu/kiuj la vendado celas, estas necese krei frazpartojn, kiuj komencas per rolvortetoj (prepozicioj). Tiuj frazpartoj oni povas nomi rolvortaj frazpartoj (prepoziciaj frazpartoj). En la suba ekzemplo la rolvortetoj estas markitaj per dikaj literoj.

"Nigrajn malriĉa grandajn junulo balonojn bela vendas **al** la junaj riĉaj infanoj **en** la ege granda urbo."

Ĉar la rolvorteto devas troviĝi antaŭ la vortoj, kiujn ĝi influas, ne eblas transloki la vortojn en la rolvortetaj frazpartoj ekster tiu frazparto.

Nigrajn malriĉa grandajn junulo balonojn bela vendas al la junaj riĉaj infanoj en la ege granda urbo.

Jen ekzemplo kie mi translokis la vortojn en rolvortaj frazpartoj:

Nigrajn malriĉa grandajn junulo balonojn bela vendas al la infanoj junaj riĉaj en la urbo ege granda.

Do: Eblas ŝanĝi la vortordo en ĉiu rolvortaj frazpartoj, sed oni ne rajtas transloki unuopajn vortojn antaŭ la rolvorteto al alia frazparto kiu estas regata de alia rolvorteto. Tamen estas eble transloki la rolvortetajn frazpartojn. Jen ekzemplo:

En la urbo ege granda, al la infanoj riĉaj junaj, nigrajn malriĉa grandajn junulo balonojn bela vendas.

La fakto ke Esperanto donas tiajn eblecojn, ja ne signifas, ke oni apliku tiel ekstreman vortordon kiel en la nun prezentita ekzemplo. Mia intenco estas inter alie montri, ke la kongruenco de la finaĵoj en Esperanto estas necesaj se oni volas konservi la liberecon stile varii la lingvaĵon.

Forigu la finaĵon "-jn" de la vortojn "nigrajn" kaj "grandajn", kaj la indikilo ke tiuj vortoj apartenas al la objekto en la frazo ja malaperas. La frazo ekhavas tute alian signifon. Nome: Malriĉa granda nigra junulo vendas balonojn al la riĉaj junaj infanoj, en la ege granda urbo.

Ĉar estas pli facile memori ĝeneralan regulon ol abundon da specialaj reguloj, ofte nomataj esceptoj, ne troviĝas racia kialo forlasi la strikan kongrucon de la finaĵoj en Esperanto.

Kompreneble eblas krei gramatikan sistemon, en kiu oni ne bezonas marki la akuzativon aŭ ne bezonas "redunde" almeti pluralajn indikojn je ĉiuj epitetoj de la o-vorto. Tamen, tiam oni kreas tute novan lingvon, kiu tute ne povas esti nomata Esperanto.

Konklude: Ŝajnas al mi, ke lingvistoj, kiam oni kritikas Esperanton, unue montru en kiu maniero la gramatikaj reguloj por Esperanto malbone influas la lingvan klarecon.

KaGu:-}

Se vi volas fari komenton bv. sendu ĝin al **kgesperanto "helico" hotmail.com**